

juna amiko

septembro 2018 • n-ro 3/2018 (156)

PROGRESIGA REVUO
POR LEGEMULOJ
INTER 10- KAJ
100-JARAĜAJ

Abioj de amikeco
en Francio. Esperanto
dum granda muzika
festivalo en Pollando.
Kantu kun *Juna Amiko*.
Ekkonu Anatolion. Dormu bone! Tatuajoj.

Koboldeto

Mi lacas pro la troa laboro.
Mi ege malfeliĉas ĉar mi ne havas
tempon por ludi.

Ne parolu
tiel.



Aŭskultu tiun
rakonton...

Antaŭ multe da tempo niaj prauloj
pensis same kiel vi kaj ĉesigis la laboron.



Krom unu koboldo.

Estis senpluva epoko kaj ĉiuj el la
vilaĝanoj preskaŭ mortis sed...

Mi prenos multajn
rosojn, mi ne povas esti
sen fari ion.




Ĉu vi scias kio savis ilin?

La rosgutoj... bone mi
kredas ke ni devas
daŭrigi la laboron.



Fino



Enhavo



Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK);

Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) 4



Konversaciaj temoj: Kian hararanĝon por mi? (Judit Felszeghy, HU) 5



LUME: El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) 9

Nia sano: Dormu bone! (Renée Triolle, FR) 10



Tatuajoj: ĉu triba kutimo aŭ moda stultaĵo? (Renée Triolle, FR) 12



LUDE, la unika dua etaĝo: Belaj rakontoj el trans la montoj (Mónika Molnár, CH) 14



Legu librojn – premioj – konkursoj: Ekmiru pri la mondo, Klubo de bona libro. Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo: Anatio.



(Małgosia Komarnicka, PL) 18

Kantu kun Juna Amiko: La sorĉa kantomondo: Amikeco (Małgosia Komarnicka, PL/Luiza Carol, IL) 24



Interkultura Mondo: Finiĝis la somero... (Elena Nadikova, RU) 26



En Vroclavo oni kantis Esperantajn kantojn (Małgosia Komarnicka, PL) 30



Malstreĉiĝu kun Juna Amiko: Telero el paperaj vergoj (Małgosia Komarnicka, PL) 31



Recenzo: Ĉio havas avantaĝojn kaj malavantaĝojn (Luiza Carol, IL) ... 37

Tra Esperantujo: Abioj de amikeco (Mireille Grosjean, CH) 34



Esperanto en la muzikfestivalo Pol'and'Rock (Halina Komar, PL) 36



LASTE: Vetera krucenigmo: Ĉu ombrelo bezonata, aŭ ne? (Stefan MacGill, NL/HU) 38



Eldonanto de *Juna amiko*: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Reĵeto**: sub rekonstruo ĉe ilei.mondo.info. Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>. Vidu ankaŭ lernu.net kaj edukado.net. **Redaktoro**: Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), stano.marcek@gmail.com aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj reviziantoj**: Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio), Utho Maier (Germanio) kaj Rob Moerbeek (Nederlando). **Rubrikestroj**: Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto**: Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto**: Sebastian Cyprych, ilei.oficejo@gmail.com. **Landaj Perantoj** sur la p. 39. La sekva numero aperos en oktobro 2018. **Limdatoj por sendi kontribuojn**: ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** € 18 en tiel nomataj A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

ISSN 0230 1318



Karaj legantoj! Karaj amikoj!

En Eŭropo la somero estis tre varma kaj seka. Ĉiuj partoprenantoj de la ILEI-Kongreso en Madrido, Hispanio, kaj de la UK en Lisbono, Portugalio, povis konstati tion, ĝui aŭ suferi pro la varmeco, depende de la persono. Tamen vi legos pri pluvo kaj fulmotondro en tiu ĉi kajero, ĉar okazis en Japanio tajfuno kaj terenoglitadoj katastrofaj. Do la monda klimato estas en ĥaosa evoluo nuntempe.

Legante ĉi tiun numeron de *Juna Amiko* vi ekscios pri Turkio, belega lando, kiu situas kaj en Eŭropo kaj en Azio. Anatolio estas la nomo de la azia parto; Trakio estas la nomo de la eŭropa parto.

Jam dum miaj studoj mi povis malkovri Istanbulon kaj la urbon Izmir: temas pri bela urbo ĉe la Egea Maro. Kaj mi reiris al Turkio en 2010 por la mezorienta kongreso. Same en 2016, sed en alia regiono de Anatolio: Kapadokio, kie vidigas strangaj formoj de tereno.

Ĉu vi scias, pro kio Istanbulo estas unika urbo en la mondo? Ĉar tiu urbo situas sur du kontinentoj. Tamen la ĉef-urbo de Turkio ne estas Istanbulo kun siaj 17 milionoj da loĝantoj, sed Ankara, meze de Anatolio.

En tiu ĉi numero vi ekscios pri dormo kaj diversaj momentoj de dormo, diversaj pozitivaj efikoj de dormo. Espereble vi ne endormiĝos legante nian revuon!

Mireille Grosjean
Prezidanto de ILEI

Finiĝis la somero – la tempo de ferioj, vojaĝoj kaj Esperanto-renkontiĝoj.


Nia rubriko *Interkultura Mondo* kiel kutime rakontos al vi pri la ĉefaj someraj Esperanto-kunvenoj en la mondo: ĉi-foje pri la 51-a ILEI-kongreso kaj pri la 77-a Hispana kongreso de Esperanto en Madrido. La nova rubriko *Tra Esperantujo* raportos pri du pliaj someraj eventoj – pri Esperanta staĝo en Francio (de kie vin ĉiujn salutis mi kaj Mirejo, vidu la foton) kaj Esperanta Vilaĝo dum la grandega muzika festivalo en Pollando.



En la help-rubriko *Konversaciaj temoj* vi ekscios detalojn pri diversaj hararangoj, kaj en LUME vi kolorigos bestojn kaj objektojn en muzeo. En la numero vi trovos ankaŭ aliajn pensigajn artikolojn: pri nia sano, pri la bezono bone dormi kaj pri tatuado. La lernantoj el la svisa lernejo La Granda Ursino en Svislando

desegnigis por vi bildojn pri la libro “Ronya, filino de rabisto” kaj eĉ ludis en la samnoma muzikalo, kiu okazis en julio, kiun vi povas spekti almenaŭ sur fotoj. Kun helpo de *Juna Amiko* vi povas denove legi pri interesa libro kaj la lando Anatolio kaj ekkoni legendon pri ĝi, sed ankaŭ kanti, ĉirkaŭflugi la mondon per balono aŭ per sunenergia aviadilo, malstreĉiĝi, farante telerojn el malnovaj gazetoj, legi recenzon pri bele ilustrita porinfana libro, kontroli solvon de krucenigmo kaj ekscii multon pri la vetero: vento, pluvo, tondro-ŝtormo, tajfuno...

Agrablan legadon, karaj junaj amikoj!
Via redaktoro **Stano Marček**



Kian hararanĝon por mi?

Help-materialo por progresemuloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy.

I. La decido

Karina (K) babilas kun sia patrino (P) hejme, en la banĉambro.

K – Panjo, ĉu vi povas helpi min? Ĉu vi bonvolus veni en la banĉambron?

P – Kio okazis, filineto? Jes, tuj, mi estas venanta jam! Kial vi estas tiel plorema?

K – Panjo, mi estas lavanta la harojn... – sed enfluis akvo en la okulon, kaj mi ne trovas viŝtukon... – bonvolu trovi kaj urĝe doni ĝin al mi!

P – Estintus pli bone ĉion prepari antaŭe, kaj meti proksimen. Jen ĝi! Kie estas la ŝampuo?

K – Ho, jes, mi preskaŭ forgesis pri ĝi! Tie ĝi devas esti, sur la breto, apud la lavabo, ĉu ne?



P – En ĝi jam apenaŭ io estas, Karina. Mi aldonos iom da varma akvo... Atendu, mi verŝas ĝin sur vian kapon, disfrotu ĝin bone... Jen, ankoraŭ iom, kliniĝu pli profunde, por ke la ŝampuo povu flui ĝis la fino de viaj haroj! Frotadu vian kapon, kaj tiel la ŝaŭmo bone kovros la harojn!

K – Panjo, bonvolu malfermi la kranon, mi bezonas varmetan akvon por tralavi ilin! Ĉu vi donos al mi ankaŭ la harbalzamon? Ve! La viŝtukon, denove io enfluis en la okulojn!

P – Prenu ĝin, Karina, kaj viŝu mem viaj okulojn! Mi nun aldonos la harbalzamon... Ŝmiru ĝin sur vian hararon... Bone, kaj nun tenu la kapon por plia tralavado! Cetere, estintus pli taŭga por via hararo kruĉo da varmeta akvo kun kulero da vinagro. Tio pli briligus viajn harojn!

K – Vee! Tro malvarma estas nun la akvo, Panjo!

P – Kaj nun, ĉu pli bone?

K – Jes, Panjo, dankon! Kaj donu la viŝtukon!

...

K – Aj! Kia torturo! Panjo, ne tiel! Tio dolorigas!

P – Vi ja devintus, filineto mia, jam antaŭ la lavado kombi viajn harojn! Mi ja devas malvolvi tiujn nodojn! Tenu la sekigilon dume, Karina!

K – Panjo, mi ne plu deziras longajn harojn! Ĉiusemajne mi devas alfronti tian torturadon! Ne plu! Mi petos tondi miajn harojn! Vee, Panjo, nun tro varmega aero venas!

P – Vi havas tre belan hararon, kaj mi bedaŭrus tondi ĝin. Atendu, Karina, ĉie tie, malantaŭe, ili ankoraŭ ne sekigis.



K – Ĉu vi vidas, Panjo? Jam de preskaŭ tri horoj mi kaj vi povas fari nenion, krom okupiĝi pri miaj haroj. Mi tediĝis. Punkto, fino. Mi ekhavas mallongan frizaĵon.

II. La konsultiĝo

Karina (K) babilas kun siaj amikinoj: Marina (M) kaj Flora (F).

K – Bonege vi aspektas, Marina! Vi havas denove novan hararaĝon.

M – Dankon! Mia frizistino proponis ĝin al mi. Ĝi estas nun la plej laŭmoda!

K – Mojose!¹ Kaj ankaŭ la koloro estas ege plaĉa. Ĉe la harradikoj ĝi estas bruneca, kaj la subaj hartufoj estas tamen cindro-blondaj. Se mi ŝanĝos mian frizaĵon, ankaŭ mi farbigos ĝin al la sama koloro!

F – Ĉu vi ne jam decidiĝis al mallonga hararo? Kial vi ne jam forlasas tiun tedan hararon, kunligita per gumbendo?

M – Mi kunportis modmagazinon de la frizistino, rigardu, ĝi enhavas la plej lastajn frizaĵojn! (rigardante ĝin kune).

F – Ekzemple tiu ĉi vinruĝa estus taŭga por vi!

K – Ĉu tiu ne estas iom tro okulfrapa koloro?

M – Se kelkaj hartufoj estos vinruĝaj, dum la ceteraj brunaj, aŭ nigraj, tio estos tute plaĉa solvo, laŭ mi!

F – Unue ni elektu la hararaĝon, poste la koloron. Rigardu tiun

ĉi hirtan, ege mojosa ĝi estas, tute laŭtempa.

M – Tiu ĉi? La blonda? Laŭ mi tio ne taŭgus bone por Karina. Eble nur la koloro.

F – Mi opinias, ke por Karina pli taŭgas la iom malhelaj koloroj, ĉu ne?

K – Mi ne certas... Eble... Kaj tiu hararaĝo, la rufa, ĉu ĝi taŭgus por mi?

F – Ĝi estas interesa, malsimetria. Maldekstre la haroj iras ĝis la kolo, sub la orelo, kaj dekstre ili estas mallongaj, videblas la orelo. Laŭ mi, provu ĝin!

M – Al mi plaĉas la frizaĵo kun ondetoj, ĝi ne estas tro mallonga.

K – Por ke ĝi restu ĉiam tia, mi devus viziti la friziston ne dumonate, sed almenaŭ semajne!

F – Jen, ankaŭ tiu estas rimarkinda aspekto, brile nigraj bukloj, dum semajnoj ne necesas eĉ tuŝi ilin per kombilo!

K – Hm... Sed mi ne deziras longedaŭran frizaĵon.

F – Rigardu, tiu ĉi estas kaj longa kaj mallonga hararo! En unu flanko kaj sur la supra parto de la kapo la haroj estas longaj, ĝis la ŝultro, kaj en la alia flanko ili estas razitaj. Ĉu vi ne ŝatas tian, Karina?

K – Tute ne! La duono de la kapo estas preskaŭ kalva! Pleje plaĉas al mi la alia malsimetria frizaĵo, sed ne tiel draste, kiel tiu ĉi... Aŭ mi havigos al mi hararon ĉirkaŭe mallongan, kun dislimo meze kaj franĝo sur la frunto.

M – Kiam vi vizitos la friziston?

K – Morgaŭ posttagmeze; mi jam estas anoncita.





III. La solvo

Karina (K), la frizistino (F) kaj unu kliento, Renata (R), babilas ĉe la frizisto.

F – Bonan tagon! Bedaŭrinde, necesas iomete atendi... Dume vi povas legi niajn magazinojn, aŭ viziti la manflegistinojn, alvenis novaj ungodakoj kaj artefaritaj ungoj.

K – Bone, dankon, ĉi tio ne tro urĝas.

R – Vi havas belan hararon! Supozeble ĉio ĉi estas via propra, ĉu?

K – Ho, dankon! Ĵus mi volas tondigi ĝin. Mi jam interkonsentis pri la afero kun la frizistino.

R – Ĉu vere? Imagu, mi estas ricevonta longan, naturan hararon! Ne brunan, kiel la via, sed blondan.

K – Interese! Ĉu vi aĉetos perukon?

R – Ho, ne! Jam ekzistas pli bonaj solvoj por tiuj, kiuj havas harojn! Ekzemple, oni algluas la novajn hartufojn al viaj

propraj per iu materialo simila al vakso, kaj ĝi firmiĝas post varmigo. Sed, kiel vi vidas, miaj haroj estas maldikaj kaj malfortaj, kaj mi do devas elekti alian metodon por densigi kaj longigi mian hararon.

K – Mi eĉ ne sciis, ke tiaĵoj ekzistas...

Kaj, kiel eblas plimultiigi vian hararon?

R – Per kudrado. La frizisto simple alkudras per fadeno la novajn hartufojn al miaj hartufoj. Eble la rezulto ne estas tiel longdaŭra, sed tamen malpli kosta. Eĉ tiel mi vizitas mian friziston en ĉiu dua monato, por lavi, kolorigi la hararon kaj refari la alkudradon. Tiu procedo plenigas mian tutan posttagmezon, ĝis vespero! Vi eble povas imagi, kiom da mono mi elspezas... Nun vi estas vokata!

F – Fraŭlino, ĉu ni do ektendu viajn harojn?

K – ...Eeee... Ne.

F – Ne, ĉu? Sed ĉu ne vi anoncis, ke vi deziras tute mallongan hararangojn?





K – Jes... sed...

F – Vi do ŝanĝis vian ideon! Mi ne miras pri tio, ĉar vi havas belan, sanan hararon! Mi supozas, ke vi deziras foje variigi, kaj ne havi ĉiam la samon. Vi ricevos iom da kolorigo, por ke la haroj estu kaŝtankoloraj... Poste mi detranĉos la rompitaĵn, difektitajn finaĵojn... Antaŭ la sekigo mi ŝmiros balzamon sur vian hararon... Dum la sekigado mi kombos ĝin per cilindra broso, tiel ke la haroj volviĝu en mildaj ondoj...

K – Ho, nun mia haraĵo estas tute alia, kaj tre bela!

F – Mi ĝojas, ke vi estas kontenta! Vi povas aranĝi por vi hartuberon sur la verto, aŭ plekti ilin en du partojn, kaj ankaŭ tiel fariĝos ondoj en viaj haroj.

K – Koran dankon! Mi pensas, ke mi ne baldaŭ tondigos la harojn, sed mi venos al vi post kelkaj semajnoj, por denove aranĝi ilin!

TASKOJ

I. Legu la unuopajn dialogojn, kontrolu la nekonatajn vortojn, kaj poste respondu la demandojn, same laŭ la apartaj dialogoj:

1 a) Kion faras Karina? b) Kiun ŝi petas por helpi? c) Kial ŝi petas helpon? ĉ) Kian hararon havas Karina? d) Kiujn problemojn havas Karina pri sia hararo? e) Kion decidis Karina?

2 a) Kun kiuj bablas Karina? b) Kio estas la temo de la babilado? c) Kion ili rigardas dume? ĉ) Kial ili interesiĝas pri tiaj magazinoj? d) Kiaj estas la rigardataj haraĵoj? e) Kion proponas la amikinoj de Karina al ŝi?

3 a) Kion vizitas Karina en la tria ĉapitro? b) Kion proponas al ŝi la frizistino dum la atendado? c) Kun kiu ŝi renkontiĝas tie? ĉ) Kiucele atendas tie la alia knabino? d) Kial deziras la alia knabino falsajn harojn por si? e) Kiel eblas tion solvi? d) Kia estos la hararo de Karina post la vizito ĉe la frizistino?

4. Rigardu la bildojn: kia haraĵo plaĉas al vi pleje – kaj kial?

II.

1. Ne rigardante la dialogojn, vicigu, kiuj objektoj kaj iloj estas bezonataj por lavi, sekigi kaj aranĝi la hararon!
2. Prezentu, kiel aspektas via banĉambro, ne forgesu pri meblaro, ilaro ktp!
3. Rakontu, kiel devintus lavi siajn harojn Karina, laŭ la proponoj de la patrino!
4. Prezentu, kian haraĵon havas vi, kaj viaj (almenaŭ du) geamikoj!
5. Rakontu detale vian harlavadon kaj haraĵadon!

III.

1. Preparu dialogon (en 4 – 6 frazoj) inter frizisto kaj kliento, kiu deziras mallongigi siajn harojn!
2. Preparu dialogon (en 8 – 10 frazoj) inter frizisto kaj kliento, en kiu la frizisto malkonsilas la haraĵon, aŭ (kaj) la harkoloron, kiun la kliento deziras. La frizisto povu konvinki sian klienton!
3. Preparu dialogon (en 8 – 12 frazoj), en kiu la kliento demandas la friziston pri konsilo, por ke la haroj fariĝu pli densaj, fortaj kaj pli brilaj! La frizisto donu taŭgan respondon al la kliento!

VORTKLARIGOJ

Ŝampuo: fluida lavilo por lavi harojn. **Lavabo:** pelvo, alkroĉita al la muro aŭ ŝranketo, tablo kun kranoj kaj defluilo. **Froti:** tuŝadi korpon, premŝovante la manojn tien-reen sur ties supraĵo. **Ŝaŭmo:** svarmo da veziketoj en likvaĵo. **Krano:** aparato, per kiu oni mane regas kaj reguligas la elfluadon de akvo, ĉe lavabo, duŝilo, bankuvo ktp. **Harbalzamo:** bonodora, olea aŭ rezina likvaĵo por kuraci, fortigi, fari la harojn pli silkaj. **Ŝmiri:** froti sur iun tavolon (sur haŭton) olean, algluigeman substancon (aŭ ŝampuon). **Torturi:** kaŭzi grandan korpan aŭ/kaj animan doloregon, suferadon. **Tediĝi:** esti malagrabla impresita per troa daŭro aŭ insisto. **Hartufo:** aro, pinĉo de kunkreskantaj haroj. **Mojosa:** bonega, laŭ sociaj normoj de la junularo (modernjunstila).

El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supraj Nomu la objektojn, bestojn kaj homojn! Kion ili faras? Kiujn vestojn portas la homoj? Kiujn kolorojn havas la objektoj, bestoj kaj vestoj? Kio okazas sur la bildo?



Kolorigu! Trovu la 10 diferencojn! septembro 2018 / 9 ←



Renée Triolle

Dormu bone!

Ofte revenas diskutoj, ĉu jes aŭ ne ŝanĝi la “oficialan” horon laŭ la sezono.

Homo estas animalo, kiu adaptiĝas al la lumo kaj bezonas dormi: averaĝe, unu trionon de la vivo ni dormas. Vespertoj dormas 19 horojn el 24; ĉevalo 3 horojn. Delfenoj dormas naĝante; bovinoj dormas kun malfermitaj okuloj; elefanto aŭ ĉevalo dum la dormo staras. Multaj bestoj (ekzemple ursoj kaj testudoj) vintre dormas: la temperaturo de ilia korpo malaltiĝas, kaj la besto trovas neston aŭ enteriĝas por malpli senti la malvarmon.

Kio estas dormo?

Eĉ se ĉiu homo havas sian propran ritmon (oni parolas pri “interna horloĝo”), kiu dependas de genoj* kaj povas dormi nur 4 horojn tage (kiel Napoleono, aŭ la franca eksprezidento Ŝirak), ĉiuj homoj devas nepre dormi.

Dormo permesas fizike restariĝi. Dum la dormo konektiĝas la nervofinaĵoj (sinapsoj); plifortiĝas la denaska kaj akirita memoro (ekzemple por lerni la lecionojn); stokiĝas novaj scioj.

La konektado stokiĝas en la cerbo ĉe la frunto: novaj esploroj konkludas, ke junulo, kiu ne sufiĉe dormas, aŭ ne dormas nokte, perdas trionon de sia cerbo, ĉar la cerbo formiĝas ĝis la 25-a jaro!

Du tipoj de la dormo

Kiam ni dormas, malrapidiĝas la bazaj funkcioj: korbato, spirado kaj temperaturo, renoviĝas la muskoloj.



Esploroj permesis kompreni, kiel funkcias dormo, en kiu alternas du tipoj: la malrapida duondormo (ni dormas, povas eĉ opini, ke ni ne dormas) kaj la profunda. Ili alternas, daŭras de unu horo kaj duono ĝis du horoj. Dum unu nokto





alternas 3-5 cikloj. Depende de la aĝo, la cikloj estos pli aŭ malpli longaj; pro tio patr/in/o ne tuj kuru, kiam vekiĝis kaj ploretas la bebo, ŝi/li lasu al ĝi tempon por denove ekdormi. Homo sonĝas dum duona kaj profunda dormoj. Kvankam sciencistoj ankoraŭ ne komprenis, kiel naskiĝas sonĝoj (aŭ koŝmaroj), ili opinias, ke ĉiuj sonĝas kaj ke la sonĝoj helpas.

Bone ekdormi

Dekomence necesas doni al la bebo bonajn kutimojn: la lito servu nur al dormado; oni ne ludu, ne rigardu ekranon, ne diskutu kun geamikoj en la lito. Dormo estu en "nigra" etoso: se sunas ekstere,

fermu la fenestrojn aŭ dikajn kurtenojn, elŝaltu lampojn. Same ne estu bruo: ne sonu muziko, radio aŭ televido. Ne estu ekscitiĝo: ne tro peza vespermanĝo, nek ekranoj dum la du antaŭaj horoj, nek alkoholo, nek tabako aŭ aliaj drogoj. Sed legado estas bona okupo, se ne tro longa.

Tiaj estas la kondiĉoj en okcidento. Eble afrikaj gejunuloj ŝatos priskribi siajn dormkondiĉojn. Same interese estus koni la lulvortojn por beboj: Do-do (por francoj), baĵuŝki-baju (por rusoj), – kaj en via lingvo?

Konklude

Estu regula horaro por enlitiĝi kaj ekdormi, eĉ dum semajnofino aŭ ferioj. Sed junuloj ĉefe memoru la lastajn eltrovojn (en 2017) de la esploristoj pri psika neŭro-esploro: se juna homo dormas malpli ol 7 horojn aŭ endormiĝas tro malfrue (ĉefe semajnfine), li/ŝi perdos unu trionon el siaj cerbokapabloj kaj malpli bone sukcesos en la lernado.

(triolle.renee@wanadoo.fr)

**geno*: baza karaktero elemento (kromosoma), kiun vi ricevas pro heredo.



Renée Triolle

Tatuaĵoj: ĉu triba kutimo aŭ moda stultaĵo




Tatuaĵo estas desegnaĵo sur la haŭto, farita per inko: ĝi konstante restos, eĉ se vi maldikiĝos, grandiĝos, aŭ ne plu deziras ĝin. Do pripensu bone, antaŭ decidi. Pensu ankaŭ pri la doloro dum la “pentrado”, ĉar per pikiloj oni inkigos vian subhaŭton (ĝis 4 mm), kaj do kreos vundon, kiu devos cikatriĝi¹.

Historia kutimo

La vorto “tattoo” aperis en 1772, kiam la esploristo Cook malkovris diversajn insulojn en Pacifiko, kie lokuloj havis desegnaĵojn sur (en) la haŭto.

La vorto devenas de la tahitia *tataŭ* kaj signifis marki, desegni .

Ĉe pacifikaj triboj ĝi havas apartan simbolan signifon: transiro de infana aĝo al plenkreska, ĉar pro doloro, kiun la adolesko travivos, li montros, ke li iĝas “viro”; ĝi



ankaŭ rolis kiel distingo inter la triboj aŭ pli simple identigo de sklavoj aŭ malliberuloj.

Sed la tatuado ekzistis pli frue: oni malkovris tatuaĵojn ĉe egiptaj virinaj mumioj, kiuj aĝas pli ol 5000 jarojn; same el Nubio (1500 jarojn antaŭ nia erao); ĉe la montoj Altaj en Ĉinio, 500 jarojn antaŭ nia erao. En pli “proksima epoko”, dum la Roma Imperio, Julius Cezaro notis, ke ankaŭ bretonoj havis ilin; same ĉinaj dokumentoj tion atestas de la 2-a ĝis la 6-a jarcento.

Devigaj tatuaĵoj

Ili ekzistas nun por alproprigi beston (katon, hundon, ĝis apero de elektronikaj “puloj”: blatoj, aŭ ĉe konkursaj kunikloj). Same estis en antikva Ateno, por marki siajn sklavojn por ke ili ne forfuĝu; en la roma imperio oni tatuigis inter la okuloj la nomon de la proprietulo; same la dungitaj soldatoj estis signitaj per ruĝa fero, de tie la vorto stigmato² el la vorto stigma ktp. Pli proksime de ni, ankaŭ la nazioj tatuigis numerojn sur la brakojn de kompatindaj viktimoj, kiujn ili kondukis al koncentrejo kaj poste al la morto; ili tatuigis “Z” ĉe la ciganoj, kiujn ili konsideris “nehomoj”; ofte mafiuloj, aŭ ŝtelistoj, ekz; la japanaj Jakuzoj ricevis tatuaĵojn. Tatuaĵo senvalorigis homon ĝis la nivelo de besto aŭ sklavo. Amuze, por eviti, ke oni skurĝu³ ilin, maristoj tatuigis krucon sur la dorso (oni ne batu krucon, simbonon de Kristo, do oni ne batu iliajn dorsojn)!



Riska kaj doloriga modo

Same kiel oni markis sklavojn aŭ bestojn, en la jaroj 1990-2000 aktoroj, kantistoj kaj sportistoj komencis tatuigi sin, sed ili kaŝis siajn tatuajojn en ne videbla loko (kiam ili estas vestitaj). Nun la modo igas pli kaj pli da homoj, ankaŭ virinojn, suferi tatuajojn, kiujn oni vidos, do ne nur sur la brakoj aŭ maleoloj, sed ankaŭ sur la kolo, la dorso ktp. Ju pli maldika estas la haŭto, des pli doloriga estas la tatuado.

Per tre akra ilo (osto, pikilo) profesiulo tranĉas la haŭton kaj enmetas suben nigran inkon aŭ kemiaĵojn, pli-malpli toksajn⁴ por doni la kolorojn. Necesas tre atenti pri la riskoj enkonduki virusojn aŭ bakteriojn tra la vundo (ekz. AIDS⁵ aŭ hepatito povas esti transdonitaj); ofte okazas, ke reagas la korpo, kiu defendas sin kontraŭ la ekstera atako! La tatuado daŭras 8-10 horojn (eĉ pli, sed la homo ne toleras tion kaj devas reveni por la dua fojo), poste necesas kuraci ĝin kiel “normalan” vundon ĝis cikatrigo.

Kaj pli katastrofe estas, ke tatuajo restos eterne: la sola vojo malaperigi ĝin estas fari novan tatuadon sur la antaŭan (do evitu skribi la nomon aŭ telefonnumeron de via koramikino!) aŭ bruligi la surfacon per lasero (tre doloriga kaj kosta operacio...), sed restos cikatro, kiel post profunda brulvundo.

En kelkaj landoj leĝo rigore kontrolas la profesiulojn, por ke ili respektu san-regulojn, evitu transdoni malsanon, malpermesu al junuloj tion fari. Tiu modo



apartenas al la konsumanta mondo, sed ĝi igis 20% de la usonanoj kaj 10% de la francoj difekti sian korpon por sekvi tiun modon.


Portempa amuzajo

Se tamen, okaze de festo, vi deziras amuziĝi aŭ “beligi” vian korpon, eblas uzi portempajn tatuajojn, kiaj ekzistas en norda Afriko, ekzemple per henao. El specifaj folioj (latine *lawsonia*), kiujn oni sekigis, oni preparas polvon, aldonas akvon, citronsukon kaj sukeron kaj faras desegnaĵojn, ofte geometriajn. Tion oni ankaŭ praktikas en Sudano, Bangladeŝo aŭ Kaŝmiro okaze de edziĝfesto. Aŭ aĉetu alglueblajn desegnaĵojn, gluu sur la haŭton kaj ĝuu ĝin. Post plurfoja lavado via tatuajo malaperos. Konklude, ne cedu al tiu stulta modo, kiu eble malaperos post jaro. Vi pagos por suferi kaj poste konstante konservos tiun stultaĵon en via karno!

1) *Cikatro*: postsigno, kiu restas sur la haŭto post resaniĝo. 2) *Stigato*: marko, kiu restas post vundiĝo aŭ bruliĝo. 3) *Skurĝi*: puni per vipbatoj. 4) *Toksa*: venena. 5) *AIDS* (*aidoso*): Akirita Imun-Deficita Sindromo (sanga malsano, transdonebla per spermo kaj sango).




Belaj rakontoj el trans la montoj



La rubrikon prizorgas **Mónika Molnár**



**Legemulido
tute ne hezitis
post la lasta
interparolo**



**kun Revemulido, kiu konsilis al li
pruntepreni librojn el la biblioteko.**

Li ĝoje malkovris neniam viditajn kaj legitajn librojn. Li preskaŭ voris ilin. La bibliotekistino jam de malproksime salutis lin kaj kompreneble sciis parkere lian nomon. Estis ŝi, kiu enmanigis al li la libron de Astrid Lindgren, kies titolo estis “Ronya, filino de rabisto”. La libro vere ravis Legemulidon. Li preskaŭ forgesis eĉ manĝi aŭ dormi dum la legado. Li tre ŝatis imagi la priskribitajn rolantojn de la romano. Ekzemple, vi mem, kiel vi imagas la grizan nanon? Ĉu tiel, kiel Raphael, Maryline, Eloïse aŭ Emma?



Aŭ ni vidu kiel imagis Raphael, Nathan, Eloïse kaj Emma la ungegajn elfojn. Kaj vi? Ĉu vi imagas ilin belaj elfoj aŭ timigaj ungeguloj?



Sed tamen la plej strangaj estaĵoj de la libro certe estas la Patogrenoj!

Kiel ili povas aspekti? Legemulido longe pensadis pri ili, sed finfine tute kontentis rigardi la proponojn de Raphael, Nathan, Maryline kaj Emma, laŭ kiuj ili aspektas iel tiel:




La ĉefroluloj tamen ne estas tiuj misteraj estaĵoj, sed du infanoj: unu knabino,

Ronya kaj unu knabo, Rik. Ambaŭ estas idoj de rabistoj, sed tute ne de la sama familio. Iliaj familioj estas la plej grandaj



malamikoj en la tuta arbaro de Mattis. Kiam ili naskiĝis... jes, jes, ili naskiĝis samtempe, sed tiam ankoraŭ neniu el ili sciis pri la ekzisto de la alia! Do, kiam ili naskiĝis, estis terure granda ŝtormo en la nigra nokto. Hajlis, tondris kaj fulmis senĉese. La rabistoj de Mattis pensis, ke la kastelo donas al ili sekurecon, tamen eĉ ili time salt-stariĝis kiam fulmotondro vibrigis la murojn. Jes, ĝi trafis ĝuste la kastelon kaj disigis ĝin je du partoj. Inter ili ekestis profunda abismo, kiun poste Mattis nomis la “Abismo de la Infero”. Tiu abismo havis ne nur disigan, sed ankaŭ kunigan rolon, ja ĝi disigis la murojn, sed kurioze, iom pli poste kunigis la du infanojn. Kaj la groto! Jes, ankaŭ la groto estis tre grava en la historio! Ĝi estis loko ankaŭ de ĝojoj kaj ankaŭ de malĝojoj...



Legemulido tiom ŝatintus rakonti la tuton al siaj amikoj, sed ne sciis, kie kaj kiel komenci, ĉar li estis tro ekscitita pro la ĵus legita rakonto. En tiu momento li ekvidis afiŝon pri muzikalo (spektaklo kun muzikoj kaj kantoj), kies titolo

estis "Ronya, filino de rabisto". Ho, kiom ĝoja li estis! Ja ne eblas, ke tiu titolo kaŝu alian rakonton ol tiun, kiun li tiom ŝatis. Li tuj aĉetis biletojn kaj invitis ĉiujn Ulid- amiketojn al la spektaklo. Ni iru vidi ĝin kun ili.

Ronya, filino de rabisto



Ronya naskiĝis en la kastelo de Mattis. Ŝia patrino Lovis ĉiuvespere kantis al ŝi la kanton de la lupino.



Kiam ŝi iĝis sufiĉe granda, ŝi rajtis iri sola por malkovri la arbaron.



Ŝi plurfoje estis atakita de diversaj malbonaj estaĵoj de la arbaro, sed iu ĉiam savis ŝin ĝustatempe.



Ronya malkovris la ekziston de Rik dum la ekzercado por ne timi. Rik falis en la abismon, sed Ronya savis lin.



Ronya kaj Rik konsideris unu la alian malamiko, tamen io ĉiam kuntiris ilin. Rapide venis okazo, kiam Rik savis Ronyan.



En la kastelo de Mattis la vivo estis gaja. La rabistoj ne kompatis la riĉajn vojaĝantojn, senhonte prenis ĉiujn iliajn havaĵojn. Ĉio abundis: manĝaĵoj, trinkaĵoj kaj ankaŭ la festoj por pasigi la tempon, ĉefe dum malvarmaj vintroj.





Samtempe, ĉe Roka - la patro de Rik - regis la mizero kaj la malsato. Ronya sekrete helpis sian amikon kaj lian familion, pensante, ke ili havas multe tro da manĝaĵoj kaj neniu rimarkos tion.



Sed la vintraj tagoj ne estis nur por diboĉado, almenaŭ ne laŭ Lovis, kiu de tempo al tempo devigis la rabistojn iri eksteren kaj lavi sin en la neĝo. Petro la Kalva rifuzis tion.



Li estis la plej maljuna rabisto kaj pro tio Lovis konsentis, kondiĉe, ke li razos la aliajn kaj tondos iliajn harojn.



Kiam Mattis eksciis pri la amikeco inter Ronya kaj Rik, li estis kolerega, ne plu volis vidi Ronyan kaj gardigis la kastelon.



Post kelkaj aventuraĉoj Rik decidis translokiĝi en la grandan groton de la arbaro. Ronya sekvis sian amikon.



Komence ĉio iris bone, ili ĝojis pri la libereco kaj havis ĉion, kion ili bezonis: sekuran lokon, manĝaĵojn, fajron kaj tranĉilon.



La tranĉilo estas tre valora objekto, kiam oni decidas vivi en la arbaro. La disputo komenciĝis je ĝia malapero.



Rik retrovis la eĉ ne vere perditan tranĉilon kaj ankaŭ la preskaŭ perditan Ronyan. Ili ĝojis pri la repaciĝo.



Intertempe Mattis jam multege pentis, ke li forĉasis sian solan, unikan, kore amatan filinon. Pluraj personoj provis konvinki Ronyan pri la reiro en la kastelon, sed ŝi ne volis forlasi Rik. La vintro proksimiĝis, Mattis iris serĉi ŝin persone kaj tio revenigis la du junulojn en la kastelon.



Pro la peto de Ronya Mattis devis akcepti ankaŭ Rik en la kastelo, eĉ se tio ne aparte plaĉis al li. Kune kun Rik venis la tuta familio Roka, sed ne eblas havi du ĉefojn. Oni anoncis la duelon inter la du ĉefoj, kiun finfine Mattis gajnis, do li fariĝis la ĉefrabisto de ĉiuj rabistoj.



Mattis volis konsoli Rokan dirante, ke ĉiuokaze post li estos Rik la ĉefrabisto, ĉar Ronya jam anoncis, ke ŝi neniam volos esti rabisto. Bedaŭrinde la ĝojo de Roka ne povis longe daŭri, ĉar aŭdinte tion ankaŭ Rik anoncis la samon, ke ankaŭ li ne volas esti rabisto.



Jen la vivo. Malgraŭ tio ili faris grandan feston en la kastelo, kie ĉiuj kune dancis. Post la vintro Ronya kaj Rik reiris en la groton, sed promesis reveni en la kastelon ĉiam antaŭ la vintro.

Jen la fino de la rakonto, jen la fino de la muzikalo kaj niaj koraj dankoj iru al la gelnantoj de la svisa lernejo La Granda Ursino, kiuj kreis tiun ĉi spektaklon surbaze

de la libro, produktis la dekoraĵojn kaj akcesoraĵojn, kaj per siaj ludado, kantoj kaj instrumentoj ravis la spektantojn la 3-an de julio 2018. Gratulojn!



Legu kaj ĝuu



Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,
ul. Kilińskiego 14/3,
PL-59-300 Lubin,
Pollando, rete:
malgosia.
junaamiko@gmail.com



“Ekmiru pri la mondo, tra legu libron!”


La rubrikon mi komencas per la belaj vortoj de Edward Lutczyn, fama pola desegnisto de karikaturaj ilustraĵoj, afiŝoj por infanoj kaj plenkreskuloj. Mirejo Grosjean, la prezidantino de ILEI, antaŭ nelonge sendis al mi alian belan frazon: “infano, kiu legas, estos plenkreskulo, kiu pensas”.

Feliĉe, malgrandaj infanoj estas sciavidaj pri ĉio kaj mem volonte prenas librojn. Ili unue nur pririgardas kolorajn bildojn kaj poste jam interesiĝas pri iliaj tekstoj Ni eluzu tiun situacion transdonante al ili amon al libroj. Ni ankaŭ klopodu, ke legado fariĝu nia ĉiutaga kutimo kaj ne gravas kiomaĝa estas nia infano. Ne gravas, ĉu li/ŝi havas unu, du aŭ dek kaj pli jarojn... Gravas, ke ni fiksu nevarieman horon de nia ĉiutaga

legado. Legado por nia menso estas tio, kio por nia korpo estas gimnastiko.

En antaŭa numero de *Juna Amiko* mi preparolis kvin gravajn kompetentokampojn, kiuj progresas dank' al legado. Ili estis emocio, ripozo, komunikado, koncentriĝo kaj emocia inteligenteco.

Ni memoru, ke libroj ne mordas; ili englutas nin komplekse :-).



Klubo de bona libro

La Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas dank' al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn, kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo bonvolu sendi al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.




Rekomendo

Por la Biblioteko de Juna Amiko Ilia Dewi, la Esperanto- instruistino el Indonezio, rekomendas la libron “Sejuta Warna Pelangi (Miliono da Ĉielarkoj)” de Clara Ng. La indonezia aŭtoro verkis la libron por malfermi la perspektivon kaj imagipovon de infanoj. La libro enhavas 9 fabelojn, kiuj estas kompilitaj en la interesaj rakontoj.

Unu el la fabeloj “Pesta Kostum Tengah Malam” (La kostum-festo en la Noktomezo) rakontas pri la amuziĝo de bestoj, kiuj havas feston en la bestĝardeno.

La bestoj kunvenis vespere kiam la gardistoj reiris hejmen. Ekde la komenco de la festo ĉiu besto kiel elefanto aŭ simio ŝanĝiĝas en aliajn bestojn. Ili montras la diversajn kostumojn de siaj geamikoj kiuj kune loĝas en la bestĝardeno. Ekzemple



Betsi, la porko, pentris sian korpon per nigraj kaj blanka strioj, simile al zebro. Ankaŭ estis Momi, la simio, kiu ŝajnis esti birdo. Aŭskultante


la rakonton la infanoj imagas la veran aspekton de la bestoj kaj ekscias, ke ili amuziĝas same kiel maturaj homoj.

La alia fabelo havas titolon “Milo Sedang Bosan” (Milo tediĝas). Ĝi rakontas pri la maltrankviliĝo de Milo, la ŝarketo, kiu ferias

de lernejo. Li ne plu volas resti en la hejmo, sed havas ideon por ĝeni siajn amikojn, timigi ilin kaj laŭte ridegas pro ili. Milo ne sciis pri la kaoso kiun li kaŭzis al la loĝantoj de la submara mondo.

Konklude, tiu ĉi libro ebligas al la leganto ekkoni la vidpunkton de la infanaĝo, pri kiu la plenaĝuloj ofte forgesas.

La infano senkulpe pasigas la tempon; de mateno ĝis nokto ŝatas ludi kun siaj geamikoj, sperti amuzaĵon... Pro tio ĝia vivo estas simpla.





Ekkonu mian landon pere de ĝiaj legendoj

Konkurso ne nur por junaj legantoj



Ĉi-numere mi proponas viziti la azian parton de la hodiaŭa Turkio, Anatolion, kaj fakte kelkajn el la antikvaj vidindaĵoj de la centra Anatolio.

La materialojn helpis al mi prepari Vasil Kadifeli, turka esperantisto, emerita komputika programisto, la ĉefredaktoro de la revuo *Turka Stelo*. Li ankaŭ elektis kaj tradukis legendojn por vi.

Prenu mapon, trovu Turkion kaj per kelkaj informoj, trovitaj en interreto,



konatiĝu kun ĝi. Poste tralegu la rubrikon kaj klopodu trovi sur la mapo la menciitajn lokojn kaj fine faru la konkursajn taskojn.

Kio allogas min en Anatolio?

Anatolio (turke Anadolu) estas la historia regiono de Turkio, kiu enhavas tutan duoninsulon de Malgranda Azio. Ĝi estis kerno de la greka kaj kristana bizanca imperio kaj la turka kaj islama otomana imperio. Nuntempe ĝia surfaco estas ĉ. 95% de la tuta Turkio.

La nomo de Anatolio devenas de la greka vorto *anatolē*, kiu signifas *sunleviĝo* kaj do

temas pri la lando de sunleviĝo. Turke la nomo estas *anadolu*, kiu signifas la landon plenan de patrinoj – *ana* – „patrino” kaj *dolu* – „plena”.

Etne, antaŭ 3000 jaroj, Anatolio estis plena de hindeŭropaj etnoj (la hitotoj, la frigianoj, la ionianoj). Post Aleksandro la Granda ĝi grekiĝis, poste kristaniĝis, fariĝinte la koro de la bizanca imperio. Kiam la turkoj konkeris Anatolion (de 1000 ĝis 1453), ĝi turkiĝis kaj islamiĝis, fariĝinte la koro de la otomana imperio.

Rigardante mapon vi vidos, ke Anatolio troviĝas inter la maroj: norde Nigra, okcidente Egea kaj sude kaj sudokcidente Mediteranea. Unu el la plej malnovaj urboj de tiu regiono estas Konya. Multaj opinias, ke ĝi estas la plej bela urbo de Turkio. Ĝuste en tiu urbo ekestis la fama Ordeno de la Mevleviaj dervişoj, kiun fondis en la 13-a jarcento la granda sufia poeto



La malnova urbo Konya.



La dancantaj dervişoj.

Ĝalal-ed-din Mohammad Rumi [konata kiel Rumi]. Mevleviaj dervişoj estas ankaŭ konataj kiel dancantaj dervişoj, ĉar ili sekvas ceremonion, konsistantan el danco-meditado (nomata *Sema*), per kiu la maskla danco estas akompanata de flut-muziko kaj tamburoj. La dancantoj rondiras sur si mem, kun etendiĝintaj brakoj, simbolante la “spiritan supreniron al la vero, akompanataj de la amo kaj tute liberigitaj de la memo”. La ceremonio originis inter la mistikuloj de Hindio kaj la turkaj sufianoj. En la jaro 1923 la mevlevia ordeno estis malpermesita en Turkio, sed en ja jaro 1950 la registaro rimarkis, ke la dervişa danco estas bona turisma allogaĵo kaj ree donis la permeson. Nuntempe la dervişoj prezentas la dancojn ofte en turismaj lokoj, inkluzive de muzikfestivaloj eksterlande. En la jaro 2008 mevlevia ceremonio estis enlistigita en la Nemateria Mondan Heredaĵon de Unesko.

Ĉ. 150 km de Konya troviĝas la dua plej granda akvorezervujo en Turkio, la lago Tuz (turke Tuz Gölü), kio signifas “la sala lago”. La lagoakvo enhavas 32,9 % da salo. De tie venas 70 % de la konsumata salo en Turkio. Ĉe la laga rando kreskas junkoj kaj plimulto de la turkaj rozkoloraj flamengoj tie nestumas. Proksime de la lago nestas ankaŭ la blankfrunta ansero kaj la malgranda turfalko.

En la turista centro de Kapadokio estas la vilaĝo Göreme (antaŭe Avcılar). Tie troviĝas kolekto de la plej belaj preĝejoj kaj fantastaj valoj por piediri. En la vilaĝo

Ürgüp okazis la 9-a MONA, Mezorianta Kunveno de Esperanto, en la jaro 2016. Proksime estas la subteraj urboj Kaymakli kaj Derinkuyu. Ĉe la piedo de la vulkano Erciyes Dagi estas Kayseri. En la urbo oni povas agrable pasigi tempon, admirante multajn antikvajn restaĵojn, interalie moskeojn (loko de islama malfermita diservo) kaj madrasojn (origine estas araba vorto por islamlernejo). La plej belajn madrasojn vi trovos en Sivas, antaŭe provinca urbeto kaj hodiaŭ metropolo. Se vi ŝatas montgrimpi, nepre vizitu la malgrandan urbeton Yusufeli, proksime de la montaro Kaçkar (3937m). Por skiantoj oni rekomendas viziti unu el la plej gravaj skicentroj Erzurum. Divriĝi estas urbo, en kiu troviĝas granda moskeo kaj hospitala komplekso (turke *Divriği Ulu Cami ve Darüşşifa*), konstruitaj en la jaroj 1228-29 de la emiro Ahmed Szah. Tiu ĉefverko de la islama arto estis en la jaro 1985 enskribita en la liston de la Monda Heredaĵo de Unesko.

Vizitante Anatolion ni memoru ankaŭ pri kuirarto, per kiu tiu regiono de Turkio povas nin surprizi. En la urbeto Avanos de jarcentoj oni bakas tradiciajn ujojn el ruĝa argilo, en kiuj oni preparas kaj konservas nutraĵon. En tiu ujo oni ankaŭ servas *güveç* aŭ tenas *kebapı* (kokidaĵo aŭ ŝafidaĵo en la cep-funga saŭco). Alia rekomendata manĝaĵo estas *Ürgüp kiremit kebapı*. Tio estas viandhaketajo kun cepo, ajlo kaj kapsiketo. Nepre oni devas gustumi la famajn turkajn pasteĉojn *manti* kun ajla

La lago Tuz (turke Tuz Gölü).





La tipa turka manĝaĵo kebabo.

jogurto, la bongustajn krespojn *gözleme*, la longforman picon *etli ekmek* aŭ la blankajn bombonojn *Mevlana şekeri*.

Legendoj

Karaj legantoj, mi proponas tralegi la legendon pri la kuracisto Lokman, por ekscii, kial la simbolo de medicino estas serpento, ĉirkaŭvolviĝanta sur medicina taso. Vasil preparis historian priskribon de la deveno de Istanbul, la plej granda urbo en Turkio.

La legendo pri la kuracisto Lokman

Iam en Anatolio, la ĉefa landparto de Turkio, vivis kuracisto-medicinisto, kies nomo estis Lokman. En lia magazeno troviĝis ĉiaj kuraciloj por kuraci ĉiajn malsanojn. Kiam malsanulo eniris la magazenen, la boteleto kun la taŭga kuracilo skuiĝis mem. Sed iun tagon, kiam eniris malsanulo, neniu boteleto skuiĝis. Lokman tiam komprenis la problemon kaj diris: “Se por via malsano ne ekzistas kuracilo, vi baldaŭ mortos”. Kiam la

malsanulo aŭdis tion, li vendis sian tutan posedajon, prenis sian pafilon kaj li kun sia hundo komencis vagadi sur la montoj. Li manĝis ĉasaĵojn kaj jogurton, kiun li aĉetis de la nomadoj sur la montoj.

Lia malsano estis kreskanta kaj liaj doloroj multiĝantaj. Li iam en tiuj mafacilaj tagoj lace sidigis sub grandan arbon, proksime al iu nomada tendaro, kiam iu virino alportis tason da lakto por li. Vidante la lakton, serpento alproksimiĝis al ĝi kaj verŝis sian venenon en la tason.

La viro decidis trinki la lakton, por morti, kaj tiel ĉesigi siajn dolorojn. Pro la veneno la viro terure malbonfartis, sed post iom da tempo li sentis sin pli bonfarta kaj en kelkaj tagoj li tute resaniĝis.

Li tiam reiris al la kuracisto Lokman kaj protestis, ĉar iam li diris, ke li mortos. Lokman respondis kaj defendis sin: “De kie mi povus trovi por vi la plej bonan lakton, kaj poste la taŭgan serpenton, kaj kiel





mi farus, ke ĝi verŝus sian venenon en la lakton? Mi pro tio pensis, ke ne eblis trovi por vi kuracilon.”

Ekde tiam la simbolo de medicino estas serpento, ĉirkaŭvolviganta sur medicina taso.

De kie devenas la nomo de Istanbul

Istanbul estas la plej granda urbo de Turkio, kaj tiel estis dum la Osmana Imperio, kiel ĝia ĉefurbo kaj antaŭ tio, kiam ĝi estis la ĉefurbo de la Bizanca Imperio. La urbo dum jarcentoj akiris diversajn nomojn. La historio de la urbo estas preskaŭ 8 500 jarojn longa kaj tion pruvas arkeologiaj trovaĵoj en ĝia centro. En la jaro 667 a.K. la komandanto Bizas, kiu alvenis el la antikva urbo Megara en Grekio, fondis la urbon kun sia nomo “Bizanco”.

La suba bildo montras la iaman formon de Konstantinopolo. En la centro la granda konstruaĵo estas la hipodromo.

La urbo prosperis dum la Roma Imperio. En la jaro 330 p.K., dum la regado de la reĝo Konstantino, la urbo fariĝis la ĉefurbo de la Roma Imperio. Tiam, en tiu parto de la mondo, oni parolis ĉefe la grekan, sed la reĝo Konstantino ne scipovis tiun lingvon. Konstantino faris tiun ŝanĝon eble ĉar tiam la urbo estis tre granda aŭ por pli bone regi la vastajn landpartojn de la tiama imperio, kaj ĉefe la orienton. Oni

unue nomis la urbon “Nova Romo”, sed tiu nomo ne restis kaj homoj daŭrigis la uzadon de “Bizanco”. Post la morto de reĝo Konstantino en la jaro 337 la nomo de la urbo fariĝis Konstantinopolo (el la greka “Κωνσταντινούπολης”, kiu signifas “polis” aŭ urbo de Konstantino).

Post la disdividiĝo de la Roma Imperio, la orientan parton de la Imperio oni nomis Bizanca Imperio, pro la nomo de la malnova urbo. En la jaro 1453, kiam la osmanoj konkeris la urbon, ili daŭrigis la nomon en la formo “Konstantinije”. Ĉi tie la turka sufikso “-ije” similas al la Esperanta sufikso “-ejo”, do “Ejo de Konstantino”.

Dum la Osmana Imperio diversaj nomoj estis uzataj por la urbo, sed ĉiam restis la nomo Konstantinije. Kelkaj aliaj nomoj estis: *Islambol* (“polis” aŭ urbo de islamanoj), *Dersaadet* (urbo de feliĉo), *Asitane* (granda loko, kie samkredantoj loĝas kaj preĝas). Tamen ĝis la fino de la Osmana Imperio restadis la oficiala nomo *Konstantinije*.

Dume la loĝantoj kaj ĉefe la grekoj ĉiam uzis la esprimon “stin Poli” (“στην Πόλη” en la greka, kiu signifas “al la Urbo”), ĉar la centran parton oni mallonge nomis Polis aŭ Urbo, kaj kiam homo demandis “kien vi iras?” la alia respondis “stin Poli”.

Post la fondo de la respubliko la oficiala nomo de la urbo fariĝis “Istanbul” kiel variaĵo de la esprimo “stin Poli”.



La konkursa tasko: Trovu aliajn informojn pri Anatolio kaj legendojn kaj sendu ilin al ni. Se vi ŝatas desegni aŭ pentri, sendu al ni bildojn, kiuj prezentas la tekston de la legendoj. La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj la indiko “Konkurso-legendo” ĝis la 30-a de oktobro 2018 al la adreso de la rubrikestrino. La valorajn premiojn fondis Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (pole Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej).



La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, malgosia.junaamiko@gmail.com



Kanto akompanas nin ĉie...

Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, permesas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.

Gi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, ludante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti, kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugestie alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin en fremda lingvo. La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

Mi prezentas ĉi-foje belegan kanton de Luiza Carol el Israelo, longdaŭra kunlaborantino de *Juna Amiko*. La kanto nomiĝas AMIKECO kaj Luiza estas samtempe la aŭtorino de la teksto kaj de la muziko.

Amikeco

[Refreno:]

*Amikec' nia, internacia,
esperantista, esperkantista
Amikec' nia, internacia,
samideana kaj samrevana.*

*Ĝi transpasas, ĝi transpasas
kaj dezertojn kaj arbarojn,
ĝi transpasas, ĝi transpasas
oceanojn kaj montarojn.*

*Ĝi ignoras, ĝi ignoras
kalumniojn kaj konfliktojn,
ĝi ignoras, ĝi ignoras
antaŭjuĝojn kaj militojn.*

[Refreno]

*Ĝi fariĝas, ĝi fariĝas
nia kara kor-trezoro,
ĝi fariĝas, ĝi fariĝas
la miraklo de la koro.*

[Refreno]

*Kiam venas en la mondon
nigraj nuboj de envio,
nia kara amikeco
supervivas malgraŭ ĉio.
Kiam venas en la mondon
nigraj nuboj de malamo,
nia kara amikeco
supervivas kiel flamo.*

[Refreno]

Ĉu vi scias kiel ekestis la kanto? Luiza kutimas porti insignon kun la vorto "Esperanto". Ofte okazas, ke homoj demandas ŝin: "Kion signifas tiu vorto?" Kaj ŝi tiam komencas paroli pri Esperanto kaj pri multaj bonaj amikoj eksterlande, pere de tiu lingvo. Ŝi substrekas, ke la esperantista amikeco tre bone influis ŝian vivon. Laŭ ŝi tiu bela esperantista amikeco estas la plej grava bonaĵo kiun Esperanto donacis al ŝi.

Kantu kaj lernu!

Bonvolu sendi al mi viajn proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu la eblecon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo!



AMIKECO

Vorto kaj melodio: Luiza CAROL

G D7 G Am Bm

A-mikec' ni - a in-ter na - ci - a, es per an tis ta, es per kan - tis - ta, a-mikec'

6 D7 G Am D7 G G

ni - a in-ter na - ci - a sa-mi-de - a - na kaj sam-re - va - na. Ĝi trans-
Lan - do -
Ki - am

11 Am D7 G

pa - sas, ĝi trans - pa - sas kaj de - zer - tojn kaj ar - ba - rojn, Ĝi trans-
li - mojn, lan - do - li - mojn ĝi trans - pa - sas ki - el bir - do, ling - vo -
ve - nas en la mon - don ni - graj nu - boj de en - vi - o, ni - a

15 Am D7 G D7 G

pa - sas, ĝi trans - pa - sas o - ce - a - nojn kaj mon - ta - rojn, Ĝi ig-
li - mojn, ling - vo - li - mojn ĝi trans - pa - sas ki - el ri - do, Ĝi fa-
ka - ra a - mi - ke - co su - per - vi - vas mal - graŭ ĉi - o, Ki - am

19 Am D7 G

no - ras, ĝi ig - no - ras ka - lum - ni - ojn kaj kon - flik - tojn, Ĝi ig - no - ras, ĝi ig -
ri - ĝas, ĝi fa - ri - ĝas ni - a ka - ra kor - tre - zo - ro, Ĝi fa - ri - ĝas, ĝi fa -
ve - nas en la mon - don ni - graj nu - boj de mal - a - mo, ni - a ka - ra a - mi -

24 Am D7 G D7 G

no - ras an - taŭ - ju - ĝojn kaj mi - li - tojn. A-mikec' ni - a in-ter na - ci - a, es per an-
ri - ĝas la mi - ra - klo de la ko - ro.
ke - co su - per - vi - vas ki - el fla - mo.

29 Am Bm D7 G Am


tis - ta, es per kan - tis - ta, a-mikec' ni - a in-ter na - ci - a, sa mi de - a - na kaj sam re -

34 D7 G (3)

va - na.

La melodio aŭdeblas ĉe: <https://drive.google.com/file/d/1Oho0otw2MvRjPpPYejHouJFyztCQLnhcyY/view>

(C) Luiza CAROL 2018



Rubrikestro:
Elena Nadikova,
Esperanto-klubo "Betuleto"
Lernejo/Ŝkola 56,
pr. Traktorostroitelej, 38
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio
lena_espero@mail.ru



Finiĝis la somero...



Saluton, karaj legantoj!

Vi tenas la septembran numeron de *Juna Amiko* en viaj manoj. Kaj tio signifas, ke finiĝis la somero – la tempo de ferioj, vojaĝoj kaj Esperanto-renkontiĝoj.

Jam tradicie nia rubriko Interkultura Mondo en sia septembra numero rakontas pri la ĉefaj Esperanto-kunvenoj de la mondo. Ĉi-numere temas eĉ pri du eventoj. La unua estas la **51-a ILEI-kongreso en Hispanio**. Ĝi okazis 21-28 julio. La dua estas la **77-a Hispana kongreso de Esperanto**. Ĝi okazis la 20-22

julio. Ambaŭ kongresoj pasis en Madrido – la ĉefurbo de Hispanio.

Tiu sperto estas unika por ILEI. La unuan fojon sukcese unuiĝis du grandaj eventoj. Tio bone kontribuis, certe, al ambaŭ organizoj – al ILEI kaj HEF – Hispana Esperanto-Federacio. Unue, la kvanto de la partoprenantoj de la du kunvenoj estis mirinda. Entute aliĝis preskaŭ 250 homoj. Tio estas absoluta rekordo por ILEI! Due, ambaŭ programoj bone kongruis unu kun la alia.

Dum la Hispana kongreso temis ĉefe pri Esperanto-movado en la Ibera duoninsulo. Okazis prelegoj pri Esperanto en Hispanio, pri diversaj aranĝoj kaj spertoj de la



Palacio de Komunikaĵoj (la Urbodomo)



Centro de Madrido

landa Esperanto-movado. Kunvenis fakaj asocioj, grupoj kaj unuiĝoj. Oni bele prezentis Madridon kiel la urbon de la du kongresoj. Kunvenis HEF kaj ĝia junulara sekcio. Oni omaĝis al Esperanto-pioniroj de Hispanio. Kaj, certe, la partoprenantoj bone konatiĝis kun la kastiliaj tradicioj kaj la hispana kulturo ĝenerale. Multis allogaj ekskursoj, prelegoj, prezentoj kaj aliaj programeroj pri Hispanio kaj ĝia kulturo. La gastiganta lando havis perfektan okazon prezenti sin dum du sinsekvaj Esperantaj kunvenoj.

La temo de la ILEI-kongreso estis “La Kultura Heredaĵo de Esperanto”. Tiu nomo estis elektita ne hazarde. Unesko deklaris la jaron 2018 kiel la Eŭropan jaron de kultura heredaĵo. Tial ILEI decidis fokusiĝi al la kultura fako de Esperanto-instruado kaj edukado. La programo, kiel kutime, estis abunda kaj varia. Ĝi estis grupigita en fakaj blokoj. Okazis lingvaj kursoj por du niveloj. Gvidis ilin spertaj instruistoj. La komencanta grupo fine de la kongreso prezentis malgrandan spektaklon. Ĝi havis la nomon “Egberto Noŝo kaj lia domo”. La “aktoroj” tre diligente ludis siajn rolojn. Ne ĉiam tio estis facila. Tamen novaj esperantistoj bone prepariĝis

kaj ricevis bonkorajn aplaŭdojn.

Progresantoj bone evoluigis siajn lingvokonajn. Kaj poste povis praktiki Esperanton dum la diversaj programeroj, aŭ dum amika babilado kun esperantistoj el la tuta mondo. La etoso tre valore kontribuis al tio.

Por spertaj partoprenantoj abundis prelegoj. Ili tuŝis tre diversajn temojn – laŭ ĉies preferoj. Jen estas nur kelkaj nomoj de la prelegoj: “Senpaga utila esplorado, aŭ kiel oni gajnis ŝancojn en la Universitato de Seviljo”; “Faru la rondon! Sekretaj sukcesintoj”; “Unesko-Kuriero en niaj Esperantaj klasĉambroj”; “Esperanto-Plaĝo: de revo al realiĝo en Hispanio”; “Sukcesa modelo de Esperanto-instruado en la Seula Esperanto-Kulturcentro”. – Serioza kaj impona listo, ĉu? Multis, certe, prezentoj pri diversnaciaj kulturaj heredaĵoj: la hispana, la rumana, la kroata, la afrika, la armena, la kataluna, la kuba. Ĉiuj prelegoj allogis multe da partoprenantoj.

Alia faka programo temis pri instruado de Esperanto. Ja tio estas la ĉefa zorgo por ILEI kiel la organizo de instruistoj.



ESPERANTO KAJ EDUKADO
MADRIDO 2018



Lingva Festivalo



La grupo Kajto

En Madrido unuafoje okazis EIT – Esperanto-Instruista Trejnado. Ĝi estas projekto kadre de la kunlaboro inter ILEI kaj edukado.net kun Katalin Kováts. Temas pri distanca reta preparkurso pri metodiko kaj gramatiko. Ĝi daŭris dum kelkaj monatoj. La fina parto pasis en Madrido. Okazis fizika seminario kun ĉeestaj atelieroj kaj ekzamenoj dum la ILEI-kongreso.

Aparte necesas rakonti pri la simpozio. Tio estas tradicia evento de ILEI-kunvenoj. Tamen okazas simpozio ne ĉiu-jare. La ĉi-jara simpozio estis vere brila kaj sukcesa. Ĝi okazis en Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado – UNED (*Universidad Nacional de Educación a Distancia*). La simpozio daŭris 2 tagojn. La programon eniris tre altkvalitaj eventoj. Jen estas nur kelkaj nomoj: “Eŭropa heredaĵo de Esperanto – kiel tio reflektiĝas en la lingvo”; “Internaciigo de Esperanto. Pri la solvebla eŭropoco de la interkultura lingvo”; “Interkultura lernado kaj la aldona valoro de Esperanto”; “Esperanto priservas interkulturan edukadon”; “Kontakto inter kulturoj: harmonio kaj pliriĉigo”; “Justa komunikado kaj tutmondigo”. Kaj multaj-multaj aliaj, tre interesaj eventoj okazis dum la simpozio. Ĝi finiĝis pere de konkludaj debatoj.

Ne mankis, certe, diversaj fakaj programeroj. La partoprenantoj ĝuis riĉan libroservon, foto-ekspozicion, diverstemajn atelierojn, historiajn promenadojn,

amuzan aŭkcion, interesajn lokajn vizitojn, spektadon de filmoj.

Per sia gaja majstro-klaso ĝojigis la kongresanojn la muzika grupo Kajto. Por gejunuloj oni proponis noktan programon. Ĉiuj kongresanoj povis eksprese lerni la hispanan lingvon por poste praktiki ĝin surstrate.

Certe, okazis la kutimaj eventoj, gravaj por ILEI: komitatkunsidoj, estrarkunsidoj, cerbumado kaj debatoj. Dum AMO-seminario oni tuŝis diversajn kulturajn demandojn, eksterajn rilatojn.

Unu tago estis dediĉita al la Lingva Festivalo. Ĝi iĝis tradicia aranĝo dum la ILEI-kongresoj. Ĉi-foje en Madrido estis prezentitaj 28 diversaj lingvoj. Ĉiuj prezentadoj pasis gaje, alloge kaj interese. La kongresanoj diligente lernis diversajn mondajn lingvojn. Kaj kiuj lingvoj estis la plej popularaj dum la 51-a ILEI-kongreso? Kiel vi pensas, karaj legantoj? La unua estis... la portugala. (Ja post la ILEI-kongreso sekvis UK en Lisbono.) Kaj la dua estis... la korea! Ni gratulas niajn koreajn samideanojn! Esperanto tre bone progresas en Suda Koreio. Kaj la korea lingvo reciproke interesas pli kaj pli da alilandanoj. Jen estas bona “kunlaboro” de la du lingvoj!

Riĉa estis la vespera programo. La kongresanoj bone konatiĝis kun kastiliaj tradicioj kaj la hispana kulturo ĝenerale. La ILEI-kongreso komenciĝis per tradicia Interkona Frandvespero. La kongresanoj plezure gustumis diversnaciajn manĝaĵojn kaj poste ĝuis la koncerton de la muzika



La nova estraro de ILEI (5 el la 7)



grupo “Kaj tiel plu”. Vere ĉarma estis la nacia vespero. La kongresanoj ĝuis belan hispanan gitaran muzikon de loka orkestro. Estis prezentita rava flamenko – unika nacia arto de Hispanio. Ĝiaj melodioj kaj mirindaj dancoj lasis neforgeseblajn impresojn ĉe la kongresanoj.

Ĝojigis la kongresanojn la koncerto de “Kajto”. Ankie kaj Nanne ne lacas porti al esperantistoj sian bonkoron. Kaj ni amas ilin pro tio kaj pro iliaj belaj kantoj, ĉu ne?

La hispanaj organizantoj preparis por la kongreso grandiozan spektaklon “Vivu la Teatro!” En ĝi partoprenis multaj kongresanoj kun siaj deklamaĵoj kaj kantoj.

Kaj ĉiuj povis prezenti sin dum la Internacia vespero. Sonis pola, armena, ĉina, sveda, nepala kaj Esperanto-kantoj. La ILEI-anoj ĝuis la korean, japanan, latinamerikan, nepalan, ĉinan dancojn. Ridigis la kongresanojn ŝercoj el Rumanio kaj Francio. Deklamis la partoprenantoj el Kubo. Nia samideano el Katalunio prezentis gajan improvizan kanto-analizon pri la ĉi-jara ILEI-kongreso. Vere plezurigis nin nia samideano el Kubo per siaj kantoj. Do, esperantistoj estas tre riĉaj je diversaj talentoj! Kaj ĉiam estas granda plezuro sekvi tion.

Kaj, sendube, tre varia kaj riĉa estis la ekskursiva programo de la ILEI-kongreso. Ja Hispanio plene meritas la gloron de alloga turista lando! Ĝi havas longan historion kaj riĉegan unikan kulturon. Puntaj ŝtonaj ornamaĵoj sur muroj, imponaj temploj, belegaj preĝejoj, unikaj pentraĵoj ĝojigis okulojn.

Dum la ekskursoj la kongresanoj konatiĝis kun multaj eventoj, gravaj por Hispanio. Krome, Madrido mem, kiel la ĉefurbo, certe allogis homojn. La organizantoj proponis kelkajn senpagajn ekskursojn tra la urbo, inkluzive la noktajn. La kongresanoj ĝuis promenadon tra belaj stratoj. Eĉ la vetero en Madrido favoris al la ILEI-kongreso! Ja kongresanoj tute ne suferis pro varmeĉo, kiel eblus atendi en Hispanio. La vetero en Madrido estis tre



La plena luna eklipso

agraba dum la tuta kongreso. Do, la naturo favoras al Esperanto, ĉu, karaj legantoj?

Kaj, sendube, vera surprizo por la kongresanoj iĝis... plena luna eklipso! Ĝi okazis la 27-an de julio, dum la lasta vespero de la ILEI-kongreso. La organizantoj avertis nin pri tio kaj invitis spekti ĝin. Feliĉe, tio eblis eĉ en la kongreseja areo. Unu el niaj samideanoj trovis perfektan lokon por la observoj. Danke al li mi kaj kelkaj aliaj kongresanoj vere ĝuis la eklipson! Ĝi daŭris kelkajn horojn kaj estis tre klare videbla! La luno estis ronda, hela, malgraŭ la eklipso. La nokto estis klara, kvietaj, kun sennuba ĉielo. Nenio malhelpis observi kaj ni longe ĝuis la naturan rarajon. La ombro malrapide reiris de la luno. Nekredebla vidaĵo! Neniam en mia vivo mi spektis nature sur la ĉielo veran lunan eklipson! Tiuj impresoj longe restos en mia memoro. Kaj ili portis aldonan plezuron al la neforgesebla ILEI-kongreso en Madrido. Dankon al la eklipso, dankon al Hispanio kaj dankon al Esperanto!

Do, la 51-an ILEI-kongreson eblas plenrajte nomi sukcesa kaj fruktodona! Venis novaj ideoj. Naskiĝis novaj projektoj. Aperis novaj laborgrupoj. Estis fiksita rekorda nombro de partoprenintoj! Okazis elekto de nova Estraro. Ni deziru al ĝi sukcesan laboron, plian evoluon de la Ligo! Kaj prosperon al nia komuna bonega lingvo Esperanto! Ni bonvenigas vin al nia sekva ILEI-kongreso kaj al aliaj Esperanto-renkontiĝoj!



En Vroclavo oni kantis Esperantajn kantojn



**Eŭropa Festivalo
de Esperantaj Kantoj**
Europejski Festival Piosenki Esperanckiej

La 19-an kaj 20-an de majo 2018 en Vroclavo, en Zespół Szkół Nr 14, okazis la 6-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, patronata de Eurokka, *Juna Amiko* kaj s-ino Mila van der Horst-Kolińska.

Ĉi-jare la festivalon preparis memstare la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, ricevante partan monsubtenon de la urbo Vroclavo (www.wroclaw.pl) kaj Universala Esperanto-Asocio.

En la festivalo partoprenis infanoj, junuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj en du kategorioj: solisto kaj koruso aŭ ensemblo. Ĉiu partoprenanto kantis du kantojn: unu en Esperanto, la alian en sia gepatra aŭ fremda lingvo. Pritaksataj estis nur la Esperantaj kantoj.

Sabate la 19-an de majo okazis konkursa provaŭskultado de la partoprenantoj, kiun lerte gvidis Halina Kuropatnicka-Salamon. La ĵurio, kiun konsistigis aro da specialistoj – esperantistoj (Małgosia Komarnicka el Pollando kaj Jean-Marc Leclercq el Francio) kaj muzikistoj (Wojciech Ławnikowicz kaj Marek Szpigelman el Pollando) – prijuĝis la prezentiĝojn de la partoprenantoj. En la pritakso estis konsiderataj: lingva ĝusteco, originaleco, inventemo kaj estetikaj valoroj.

Dimanĉe la 20-an de majo okazis Koncerto de la Premiitoj, kiun gvidis Małgosia Komarnicka, la iniciatinto de la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kaj JoMo, E-kantisto kaj posedanto de Guinness-rekordo. Post mallonga prezento de la festivala regularo la publiko

kun plezuro aŭskultis la premiitajn kantojn, kaj fine de la koncerto de la premiitoj JoMo tiel dancige kantis, ke la publiko, ĝuante la belajn kantojn en Esperanto, dancis sur la scenejo kaj apud ĝi.

La premiitoj ricevis diplomojn, pokalojn, belegajn albumojn, memoraĵojn, florojn kaj donacintajn de Halina Kuropatnicka-Salamon volumetojn de poezio, kaj de Stefan MacGill ili ricevis Esperantajn lernolibrojn kaj ekzemplerojn de la revuo *Juna Amiko*. Ĉiuj partoprenantoj ricevis diplomon pro la partopreno.

La ĵurio jam tradicie aljuĝis ankaŭ premiojn pro akompanado. Krome estis du novaj premioj: Grand Prix kaj Publik-premio. La premion Grand Prix ricevis Ewa Domańska el Vroclavo, kaj la Publik-premion ricevis la konata koruso O'kropy el Góra. La organizantoj aprezis ankaŭ la penan laboron de la tradukistoj kaj de la ĵurio.

Ni jam nun invitas vin al Vroclavo ĉeesti en la sekva, 7a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kiu okazos en 2019, ankaŭ en majo.

Por la estraro de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado

Małgosia Komarnicka





Malstreĉiĝu kun Juna Amiko

Telero el paperaj rulaĵoj

Ĉiu el ni aĉetas gazetojn, ricevas reklamilojn, kaj poste forĵetas aŭ kolektas ilin, ne sciante, kion fari kun tiuj forĵetindaĵoj.

Dum la jaro ni ĉiuj arigas tunojn da paperaĵoj. Kaj ni ja sukcese povas eluzi ilin, donante al ili “la duan vivon”.

Mi prezentas al vi sinjorinon Bożena Zajączkowska el Góra (Pollando), kiu amas la naturon, la kantojn de birdoj, ŝatas legi librojn, okupiĝi pri diversaj manlaboroj – kaj ĉiam pozitive rigardas la mondon.



Ŝi preparas el eluzitaj paperoj belajn kaj elegantajn galanteriaĵojn, korbojn, juvelaĵojn ktp. Laŭ ŝi la papera rulaĵo estas la plej simpla metodo transformi paperajn forĵetindaĵojn, kiujn ni povas eluzi. Tiu papera “vergo” (rulaĵo, tubeto) estas sufiĉe forta kaj solida kaj sukcese povas anstataŭi naturan vergon.

Mi proponas al vi dediĉi iom da tempo por mem prepari belan donacon, uzante

nebezonaĵojn. Dank’ al indikoj de Bożena vi memstare preparos teleron por fruktoj aŭ bombonoj.

Materialoj:



- malnova gazeto
- bastoneto por ŝaŝlikoj
- gluo por ligno (papero)
- akrilfarbo (ne necese)
- akrillako
- peniko



Priskribo de la realigo:

Gazeton tondu al mallarĝaj rubandoj, ĉ. 10 x 50 cm. Al la angulo de la gazeto metu oblikve bastoneton kaj rulu la paperon.



Ekestas tubeto. Gluu ĝian finaĵon kaj eltiru la bastoneton. Ĉiun tubeton platigu. Sammaniere faru sekvajn tubetojn.

La unuan tubeton ŝmiru per gluo kaj volvu al rondo. Al la rondo algluu sekvan tubeton. En tiu maniero faru teleron, zorgante pri ĝia formo. La telero, kiu estas sur la foto, bezonis 60 tubetojn. Fine ŝmiru per gluo la tutan teleron, eventuale pliperfektigante ĝian formon kaj lasu, ke ĝi sekiĝu. Sekve kolorigu ĝin per farbo, sed ne nepre. Via telero bele aspektos





ankaŭ gazetkoloro. Nepre tamen kelfoje laku la teleron. Tiam ĝi estos solida kaj vi povos senpolvigadi ĝin per malseka viŝilo. Tamen ne lavu ĝin per akvo.

Per tiu tekniko vi povas fari diversajn aĵojn kaj inventi aliajn formojn. Vidu foton el la kolekto de Božena...

Se vi pensas, ke vi ne scipovas fari tiun teleron, vi vere eraras. Božena



Zajączkowska mem ellernis tiun teknikon, estante jam emeritino. Tiu tekniko postulas multe da pacienco kaj precizeco, sed la fina efekto admirigas kaj tial valoras provi tion, eĉ se la unua provo ne estas plene sukcesa.

En Pollando de 2001 okazas Festo de Papero, ĉiujare julie en la Muzeo de Papero en Duszniki-Zdrój. Oni prezentas tie ankaŭ produktaĵojn el papera vimeno.

Malstreĉiĝu: Bonvolu sendi al mi viajn proponojn de viaj ŝatokupoj kun priskribo, ke la legantoj de *Juna Amiko* havu eblon ekkoni ilin.


Małgosia Komarnicka





Luiza carol:

Ĉio havas avantaĝojn kaj malavantaĝojn



**Pri “La heliko Slavek en sunflora kampo” de Sonja Zubović.
Elkroatisigis Judita Rey Hudeček.
Ilustris Marina Badurina Cindrić.
Eldonejo Tekston, Zagreb 2014.**

Nun mi prezentas libron kun tre allogaj kartonaj kovriloj kaj multaj belegaj koloraj ilustraĵoj sur brila papero. Mi konservas ĝin sur la skribotablo kiel valoran artaĵon, kiu plibeligas mian ĉambron. La libro karas al mi ankaŭ pro tio, ke la rakonto pri la ĝentila kaj amikema heliko Slavek rememorigas min pri tre grava afero, kiun mi spertis ofte, sed inklina forgesi, samkiel multaj aliaj homoj. Temas pri la fakto, ke ĉiu aspekto de la vivo havas kaj avantaĝojn kaj malavantaĝojn.

Ekzemple, se vi loĝas vid-al-vide de via infanĝardeno aŭ lernejo, vi povas vekigi pli malfrue ol tiuj, kiuj loĝas malproksime. Tio estas avantaĝo, ĉu ne? Sed tiam vi ne ĝuas la ĉiumatenan promenadon kaj gajan babiladon kun viaj gepatroj aŭ kun geamikoj, survoje al via infanĝardeno aŭ lernejo. Tio estas malavantaĝo, ĉu ne?

Mi donis al vi tre simplajn ekzemplojn. Sed kelkfoje la vivo estas tia, ke ni malfacile povas trovi ajnan avantaĝon koncerne teruran malfeliĉon. Mi tutkore deziras, ke vi ne spertu tiajn cirkonstancojn... Tamen, eĉ tiam oni povas esperi, ke la malfeliĉo igos nin pli saĝaj kaj pli bonkoraj, tiel ke ni povu kompreni la malfeliĉojn de aliuloj kaj provu helpi laŭeble, aŭ almenaŭ ne malhelpi.

Aliffoje la vivo estas tia, ke ni malfacile kapablas imagi ajnan malavantaĝon

koncerne grandegan bonŝancon. Mi deziras, ke vi spertu ĝuste tiajn okazaĵojn, kiel eble plej ofte. Tamen, nepras rememori, ke feliĉoj, same kiel malfeliĉoj, ne estas senfinaj. Kiam ni forgesas pri tio, ni povas suferigi aliulojn kaj ankaŭ nin mem.

En la libro temas pri la neatendita renkonto inter Slavek, amikema kaj ĝentila heliko, kaj paro de fanfaronemaj sunfloroj, kiuj nomiĝas Sunflorinjo kaj Sunflorĉjo. La vantaj floroj malaprezas la vivmanieron de la heliko kaj primokas lin pro tio, ke li portas ĉiam sian dometon surdorse. La aroganteco de Sunflorinjo kaj Sunflorĉjo atingas la kulminon, kiam ili diras, ke Dio amas ilin pli ol la helikon. Tiam Slavek respondas digne:

“La kara Dio amas min, la honestan helikon Slavek, same kiel vin! Mia dometo estas mia feliĉo; ĝi tute ne pezas al mi.”

Kiam vi legos la libron, aŭ kiam oni legos ĝin al vi, vi ekkonos la malfeliĉan cirkonstancon, kiu igis la sunfloran paron ege aprezi la avantaĝojn de portebla domo kaj sincere pardonpeti pro tio, ke ili ofendis la helikon.

“Ĉio havas avantaĝojn kaj malavantaĝojn” – konkludis Slavek. – “Bele, ke vi pardonpetis. Nun ja estas tempo, ke mi foriru. Mi salutas vin kaj mi deziras al vi multe, multe da suno, karaj sunfloroj!”

El ĉiuj eksterordinare belaj ilustraĵoj de la libro, mi pleje ŝatas tiujn, kiuj ilustras la ĝojigan finon de la rakonto: la repaciĝon inter la floroj (kiuj iĝis pli saĝaj kaj humilaj) kaj la heliko (kiu iĝis pli pardonema kaj pacienca). Mi scivolus ekscii kiujn ilustraĵojn vi preferos, kiam vi rigardos la tutan libron...



Mireille Grosjean

Abioj de amikeco

En Ĵuraso abundas abioj; temas pri grandaj arboj altaj; ili estas pingloarboj konstante verdaj. Kristanoj kaj ankaŭ nekristanoj kutimas uzi tiajn arbojn je Kristnasko por ornami sian ĉambbron por familia festo.

Eble mi estus devinta komenci per prezento de tiu montaro Ĵuraso, en Eŭropo, kiu situas iom norde de la Alpoj kaj kiu enhavas regulajn kaj paralelajn faldojn verdajn en alteco de 1200 ĝis 1600 metroj super la marnivelo.

En Métabief, franca Ĵuraso, staras domo, kies nomo estas “La abioj de amikeco”).

Ĝi havas kvin etaĝojn kaj 80 litojn. Vasta salono povas kunvenigi grandan grupon da homoj por manĝi, studi aŭ ludi. Tie okazadas Esperanto-staĝoj; tie okazis SFERO, Svisa Familia Esperanto-Renkontiĝo. Tie Stano Marček kaj mi restadis en aŭgusto 2018 kaj kune fotiĝis por vi.



Tiu granda ĉaledo apartenas al la asocio “Relais International de la Jeunesse”, internacia gastejo de junularo, fondita en 1948 en Allos en la provencaj Alpoj.





La celo de la akiro de tiu granda konstruaĵo renovigenda estis proponi feriojn kaj skieblecon al malriĉaj infanoj de la pariza regiono.

En tiu epoko venis nova leĝo, kiu iniciatis feriojn por ĉiuj; tamen por ferii, oni devas havi iom da mono por vojaĝi kaj akiri ekipaĵojn por skiadi. Do grupo da homoj kuraĝe akiris la domon en Métabief kaj renovigis ĝin. Ĉio estis kaj estas farata per volontula laboro.



Jen Babette Martinez, ŝi estas 75-jara, (sur la foto) estas volontulino, kune kun sia edzo. Ili ambaŭ loĝas apud Nice en suda Francio kaj ili venis al Métabief por labori okaze de Esperanto-staĝo. Li kuiris, ŝi helpis, servis, purigis. Danke al ilia laboro kvardeko da esperantistoj povis studi dum plena semajno kaj malkovri la regionon de tiu parto de Ĵuraso. Plie ili ankaŭ devis lavi kaj sekigi la teleraĵojn.



Babette ŝatas esti en kontakto kun homoj. Ŝi triste agnoskas, ke nuntempe malmulte da homoj konsentas fari volont-

ulan laboron; multaj homoj sidas ĉe sia komputilo kaj retumas, sed labori por aliaj homoj sen ia rekompenco, tio ne oftas, laŭ ŝi.

Tamen ni pensu pri nia Movado. Tie preskaŭ ĉiuj laboras volontule por instrui, por mastrumi lokan klubon, por prepari informilojn. Tio estas valora trajto de nia Movado kaj ni devas plu klopedi en tiu direkto.

Dum la Esperanto-staĝo en Métabief havis koncerton ankaŭ la germana kantisto Jonny M. Jen lia sinprezento:

Mia nomo estas Jonas, mi havas dudek ok jarojn kaj mi muzikumas kiel artisto "Jonny M". Mi jam faras muzikon ekde mia infanaĝo. En la jaro 2006 mi komencis pli profesie produkti albumojn. Kvar jarojn poste mi eksciis pri Esperanto per la interreto kaj eklernis ĝin. Samtempe mi jam kreis kantajn tekstojn en ĉi tiu universala lingvo.

Nuntempe mi kantas plej multe en Esperanto, sed ankaŭ en la germana kaj kelkaj kantoj estas ankaŭ anglaj. Ĉiujare mi havas multajn koncertojn en Esperantujo en diversaj landoj. La plej foraj de mia devenurbo en Germanio estas Japanio, Indonezio, Brazilo kaj Togolando.

Krom mia muziko mi nun iĝas memstara kiel retdezenisto kaj retprogramisto. Sed mia revo estas iĝi artisto kaj financi min almenaŭ parte de tiu laboro. Pro tio mi ĝojegas pri la subteno de tiom da samideanoj tra la tuta mondo!





Halina Komar

Esperanto en la muzikfestivalo *Pol'and'Rock*



Jam la trian fojon okazis en Pollando “Multkultura Vilaĝo Esperanto”, kunlabore kun TEJO, la lingvoeduka platformo Duolingo kaj kun helpo de UEA, dum la grandega muzika festivalo, kiu dum 23 jaroj havis la nomon “Haltejo Woodstock”.

Ĉi-jare la festivalo ŝanĝis la nomon al *Pol'and'Rock*. Ĝi probable estas la sola tiom granda festivalo, tute senpaga, ĉar ĝi estas organizata de la karitata fondaĵo kiel danko pro la volontula laboro de centmiloj da junaj homoj en Pollando, Eŭropo kaj sur aliaj kontinentoj. Celo de la agado estas kolekti monon por hospitala aparataro. Jam oni sukcesis kolekti por tiu ĉi celo pli ol 100 milionojn da polaj zlotoj = 23 milionojn da eŭroj ĉiujare (vintra Kampanjo WOŚP).

Danke al la helpema junularo, estis savitaj ekzemple tro frue naskitaj infanoj, kun pezo malpli ol unu kilogramo, kun gravaj denaskaj malsanoj... Tial la festivalo estas ne nur amuziĝo, sed ankaŭ kunesto de tre valora junularo, entuziasme kaj volontule laboranta dum vintro por noblaj, karitataj celoj...

En Kostrzyn nad Odra, ĉe la pola-germana landlimo, nur 100 km de Berlino, amuziĝis amike kaj gaje centmiloj da junaj homoj laŭ la festivala alvoko: Amikeco-Amo-Muziko. La nombro de la ĉeestantoj ĉi-jare superis 700 000 (!!!). Regis tie grandioza etoso – neimagebla ĝojo pro kunesto de tiom granda junulara homamaso.

Kiel antaŭe, la Multkultura Vilaĝo Esperanto situis sur la tereno de ASP (Akademio de Belegaj Artoj). En la programo furoris Esperanto-lecionoj de Stano Marček (po 3 unuhoraj kursoj





por komencantoj antaŭtagmeze kaj po 3 unuhoraj kursoj posttagmeze) kaj prelegoj de Kamil Dudkowski pri malmultekosta vojaĝado/vagado tra la mondo. Novaĵo, enkondukita ĉi-jare, estis la programo direktita al infanoj kun la gepatroj – tio vivigis dum antaŭtagmezo la duan tendon, kiam antaŭ ĝi kaj interne, edukitaj por la fako, knabinoj okupiĝis pri infanaro, alvenanta al nia tendumejo.

Tre alloga estis la nova programero „Five o'clock” kun interesaj diskutoj, allogantaj plenan tendon da gastoj kun filozofiaj intereso. Estis ĝojige kaj interese, ke ni atingis propran publikon de inteligentaj, diskutemaj homoj. Nia “Vilaĝo Esperanto” jam estas konata kaj traktata kiel agrabla, gastama loko. Revenadas al ni gastoj el la pasintaj jaroj.

Nuntempe mi vidas sencon en kunlaboro kun Duolingo, ĉar estis rimarkita ilia bona volo por teni la kontaktojn kun la Esperanto-movado: surprize vizitis nin unu el la pasintjaraj festivalaj lernantinoj de Stano, kiu per tio ekinteresiĝis pri Esperanto ĝenerale kaj poste finis la Esperanto-kurson per Duolingo. Imagu – ŝi montris en sia saĝtelefono la informon ricevitan de Duolingo-administranto, ke dum Pol'and'Rock-Festivalo okazos la evento, kiun oni invitas al Vilaĝo Esperanto... Tia devas esti modela uzo de rezultoj/produktoj de informaj kaj promocioj kampanjoj. Ni sukcesis prepari la ŝildon

kaj markemblemojn de Duolingo kaj ni multe parolis dum la vesperoj kaj diskutis pri la lingva platformo kaj ĝia sukceso tra la mondo. Ni jam planas la Duolingo-eventon prezenti dum ARKONES kaj KAEST, ĉar ni vidas tie la potencialon – intereson de homoj.

La valoron de nia festivala agado konfirmas ankaŭ la subskribo de interkonsento pri kunlaboro de nia centro kun la kontraŭrasisma kaj kontraŭdiskriminacia organizaĵo NENIAM PLU, kiu invitis nin al kunlaboro kaj komunaj tutlandaj kampanjoj.


La lastan fojon venis al la Festivalo Kazimierz Krzyzak – la iniciatinto de nia tiea ĉeesto. Li estas emerita Komodoro de Mararmeo, kiu ĉi-jare fariĝis 90-jara! Li deĵoris ĉe la informa stando de mateno ĝis nokto. Li volis doni al tiu ĉi celo sian tutan forton kaj adiaŭi multajn homojn, kiuj venis kun li paroli.

Supre estis montritaj avantaĝoj de la ĉeesto de Multkultura Vilaĝo Esperanto por la movado, sed ankaŭ la neuzitaj rezultoj de tia laboro. De jaro al jaro ni lernas tiean agadon, atingas spertojn, esploras bezonojn de festivalanoj kaj provas antaŭvidi iliajn interesojn. Dum la 3-jara ekzisto de la Multkultura Vilaĝo Esperanto ĝi fortiĝis kaj saĝiĝis la teamo. Bedaŭrinde iom mankas la intereso kaj kunlaboro kun funkciuloj de junularaj organizaĵoj, sed feliĉe ni havas lokan junularan grupon, kiu – mi esperas – baldaŭ prenos la taskon el miaj manoj.



Vetera krucenigmo

La rubrikon
prizorgas:
Stefan MacGill



Ĉu ombrelo bezonata, aŭ ne?

Kia estos morgaŭ la vetero? Jen ofta frazo, se ekskurso estas en la planoj. Oni volas scii, ankaŭ por decidi kiel vesti sin, kaj ĉu, ekzemple, porti ombrelon. Jen kelkaj bazaj veteraj fenomenoj:

Pluvo falas el nuboj, kiam la aero ne plu kapablas enteni la tuton de la akvo-vaporo. Tipe tio okazas, kiam la aero malvarmiĝas. La pluvo atingas la teron, kiam la dikeco de la nuboj estas la duoblo de la distanco inter la nubo kaj la tero.

Vento blovas, kiam estas signifa diferenco en la aer-premo inter du lokoj. La aero fluas de loko de alta aerpremo al loko de malpli alta premo. Naturo malamas malekvilibron.

Tondro-ŝtormo ekestas, kiam inter du lokoj okazas diferenco de elektra energio. Naturo ne ŝatas vakuon. Do la forta elektra kurento trovas la optimuman vojon inter la eko kaj la fincelo kaj je la lum-rapideco saltas. Tio nomiĝas fulmo. Ĉar ĝi trovas la vojon kun minimuma rezisto, ĝi zigzagas kaj ne iras tra la aero laŭ rekta linio. Kiam pasas la fulmo, tio lasas vakuon. Oni diras, ke 'naturo abomenas vakuon'. Ja, vakuo estas ekstrema kazo de 'malekvilibro'. Do, la aero apud la vakuo ege rapidas forigi tiun vakuon. Tio kreas sonon, kiu nomiĝas tondro. Kial unue ni vidas la fulmon, kaj nur poste aŭdas la tondron?

Nu, lumo vojaĝas je 300 000 km/hore, sono je nur 1230 km/hore. Tial per kalkulo de la tempo inter la fulmo kaj la tondro eblas kalkuli kiom for estas la ŝtormo: 3 sekundoj signalas ĉ. unu kilometron.

Tajfuno estas granda ŝtormo, kiu naskiĝas en Pacifiko kaj vojaĝas ĝis apudmaraj landoj en Azio – Japanio, Ĉinio, Filipinoj, Vjetnamio kaj aliaj. La tajfuno havas fortegajn pluvon kaj ventegojn (ilia rapideco povas atingi 350 km/hore) – kiuj fluas ĉirkaŭ la 'okulo' de la ŝtormo. En Eŭropo kaj norda Ameriko la simila fenomeno nomiĝas 'uragano'.

En la pasinta numero ni aperigis krucenigmon pri la vetero. Do, nun ni revenas al la temo. La tuta temo de vetero nun havas gravan aldonan faktoron: klimata ŝanĝo. La mondo fariĝas pli varma, sekvoj de tio estas la degelo de polusa glacio, la altiĝo de akvo-niveletoj kaj la fortiĝo kaj oftigiĝo de teruraj ŝtormoj. La fina rezulto? Ve! Tero!

Vort-klarigoj: *Rezisto* = kontraŭ-staro. *Abomeni*: mal-ŝat-egi. *Vesti sin*: alpreni vestaĵojn. *Ekvilibro*: Egaleco. *Vakuo*: loko sen aero aŭ aliaj substancoj. *Ŝtormo*: Vetera fenomeno kun multa pluvo kaj forta vento. *Ĉ.* = ĉirkaŭ = proksimume. *Glacio*: frostigita akvo. *Degeli*: transiri de solida al likva formo, ekzemple de glacio al akvo.

Solve el la antaŭa numero

T	O	N	D	R	A	█
A	R	E	█	A	L	K
J	A	P	A	N	I	A
F	█	L	I	K	E	N
U	Z	U	█	O	█	O
N	U	M	E	R	O	N
O	M	B	R	E	L	O



Landaj Rezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

Aŭstralio: Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001; info@esperanto.org.au. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; acon.913548977@aon.at. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; financoj@fel.esperanto.be. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; belabutiko@esperanto.org.br. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; eab@esperanto.org.uk. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; mrvp@interpre.org; ilei@espereto.com. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; polnickypavel@seznam.cz; cea.polnický@quick.cz. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; strigo@esperanto.cl. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; arko.gong@qq.com. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; arnecasper@yahoo.com. **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; ahto.siimson@esperanto.ee. **Finnlando:** Sylvia Hämäläinen, F.E.Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere; sylvia.h@kolumbus.fi. **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; esperanto-france@esperanto.org.net. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; wolfgang.schwanzer@esperanto.de. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; zsafia.korody@esperanto.de. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid. **Hispanio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell. **Hungario:** HEA, Thököly út 58-60, II/209, HU-1146 Budapest; hungario@gmail.com, www.esperantohea.hu. HEA vendas surloke unuopajn numerojn por la kuranta jaro po 500 ft., duono de la kutima abonprezo. Plia peranto: Boris Arrate Veranes, Emma u. 3a, HU-2030 Érd, Hungary; simio_2004@yahoo.es. **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; esperanto@isl.is. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; saviogp@netvision.net.il; esperantisto@live.com. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; silkovojo@aliceposta.it. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; esperanto@jei.or.jp. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; marija@hes-keu.hr. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; irenaa@takas.lt. **Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne; akbondhus@jkn.no. **Nov-Zelando:** David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland 0753; gddewar@ihug.co.nz. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 KRAKÓW; mtatara@gmail.com. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; asocio@esperanto.pt. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; sezonoj@mail.ru. **Serbio:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, RS-18000 Niš; zciric2@gmail.com. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; petro@ikso.net. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B Igh 1303, SE-931 38 Skellefteå; leif.holmlund@telia.com. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; ch_scheidegger@bluwin.ch. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; rezamenhof@yahoo.com. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; esp.togo@cafe.tg. **Usono:** Esperanto-USA, 1500 Park Av #134, Emeryville CA 94608; usa@esperanto-usa.org. **TUTA MONDO:** Abonservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; uea@uea.org. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** ilei.officejo@gmail.com.

Multkultura Vilaço Esperanto en Pol'and'Rock

